

POLA ESPERANTISTO

(Esperantista Polski)

MONATA GAZETO DE POLAJ ESPERANTISTOJ.

Redakcio kaj Administracio: Widok 19, Warszawa.

Abono: $\frac{1}{4}$ jare 1.50 zł., $\frac{1}{2}$ j. 3 zł. jare 6 zł., Eksterlande egalvaloro

Konto en P. K. O. Nr. 12.025

La Redakcio ne resendas manuskriptojn — konservu kopion.

Redaktoro kaj eldonanto:

STANISŁAW KAROLCZYK

PROTEKTOROJ:

Prof. Dr. Odo Bajwid, Jan Kostecki, Dr. Emiljan Lóth.

SUBTENANTOJ:

Ing. Roman Iwo Dobrzański, Antoni St. Stankiewicz.

HELPANTOJ:

Dr. Ignacy Dziegieć, Włodzimierz Miernicki.

ENHAVO:

Th. Cart: Przedmowa do pewnego podręcznika. — Eska: Alvenu VI... — Henryk Sienkiewicz: Rememoroj el Marpoza. — Czesław Pruski: Kelka rememoroj el mia esperanta propagando. — Th. Cart: Pri landnomoj — El la Lingva Komitato. — Ze ŝwiate esperancklego.

Eldonejo

„ESPERANTISTA VOĈO“

(posedantö: S. Grenkamp-Kornfeld)

JASŁO (Pollando)

liveras ĉiujn esperantajn eldonaĵojn laŭ originalaj prezoj. La prezoj estas en svisaj frankoj pageblaj en zloty laŭ ĉiutaga kurzo je nia poŝtĉeka konto: Varsovio Nro 140.683.

Ni rekomendas inter aliaj:

AVSEJENKO, Fraŭlino Suzano	1.20
DOROŜEVIĈ, Orientaj fabeloj	1.50
EN SVISLANDO, kun ilustraĵoj	3.—
FORGE, Abismoj	2.30
STAMATOV, Nuntempaj rakontoj	1.50
SUTTNER, For la batalilojn bind.	8.—
WISEMAN, Fabiolo	6.50

Postulu nian prezaron!

POLA ESPERANTISTO

(Esperantysta Polski)

MONATA GAZETO DE POLAJ ESPERANTISTOJ.

JARO XX.

Warszawa, Junio, 1926

Nr. 6 (124)

Przedmowa do pewnego podręcznika

Problem języka międzynarodowego nie jest czysto lingwistyczny", lecz także, a może szczególnie „socjalny". Doskonałość tutaj mniej leży w samym języku, niż w zupełnej harmonji tych, którzy go używają.

Stworzenie powszechnego języka *a priori*, wymaga pierwsze — jeśli jest ono czemś innem niż zwykłą zabawą — starannej, nader dokładnej klasyfikacji ludzkiej wiedzy, której wyrazem byłby taki język. Ale ta klasyfikacja oddala się tem bardziej, im bardziej rozszerza się pole nauki, im więcej powstaje nowych dróg które znów ze swej strony są między sobą równoległe, czy krzyżujące się.

Jedną z zasług Dra Zamenhofa jest to, że pojmował on zupełnie inaczej tę sprawę i jej rozwiązania szukał *a posteriori*. Nie stworzył języka: wyciągnął tylko podstawy swego tworu z już istniejących języków, podał ich syntezę. Jeślibyśmy porównali języki z siłami, język jego jest „wypadkową“ tych wszystkich sił.

Ale dlaczego tak pojmował tę sprawę? Dlatego, że zamiast szukać jakiegoś języka dla przyjemności tworzenia go mniej lub więcej pomyślnie, on szukał przede wszystkim, a właściwie szukał *tylko* przetłomaczenia bezpośrednio idei, które wypełniały jego duszę, tak, aby go zrozumiała największa liczba ludzi, jego „bracia". Z serca wypływają wzniosłe myśli. Te wielkie myśli, głęboką miłość dla ludzkości, gorące życzenie przybliżenia królestwa pokoju, chciał on rozgłosić wszystkim ludziom, jakiegokolwiek byłyby ich języki. Dla niego język jest *tylko instrumentem*; i z tego składa się wewnętrzna oryginalność, niezwykła godność języka tak, że przyrząd ukuty dla określonego celu: *być pożytecznym* — najzupełniej odpowiedział swemu zadaniu. Przecież doskonałość jakiegokolwiek instrumentu leży w doskonałem przystosowaniu do jego przeznaczenia, do czego zawsze dąży dobry twórca!

Zapoznać liczne rzesze ludzkie z tem, co wytrysnęło z jego serca, przetłumaczyć *idee*, nie zaś tylko słowa, oto zadanie, które wziął na siebie Dr. Zamenhof w radości i bólu tworzenia. Ponieważ tak rozumiał swe zadanie, mógł odrzucić wszystkie systemy *a priori*, które oddaliłyby go od zamierzonego celu; on musiał — jako nie tylko biegły gramatyk i poliglota, ale także „apostoł” — wynaleźć coś zupełnie innego, niż zwykłą kombinację wyrazów i formuł gramatycznych, coś zupełnie innego t. j. język, potomka idei, posiadającego własną egzystencję, własną duszę, język *żyjący*.

Oto prawdziwe źródło jego całej siły, oto dlaczego zachowuje on wyższość ponad wszystkimi innymi systemami.

Ale czy z tego wypływa, że esperantyści mają konieczny obowiązek przyjąć od tego, którego nazywają „Mistrzem”, coś innego oprócz samego języka? Nie, zupełnie nie! Dr. Zamenhof oświadczył, że „Esperantystami są ci wszyscy, którzy znają i używają język Esperanto, wszystko jedno dla jakich celów się nim posługują”. Jeżeli ze swego pochodzenia nie było Esperanto językiem neutralnym t.j. obojętnym, to jeśli chodzi o zagadnienia socjalne, politykę lub religję, stało się ono takim faktycznie za zgodą samego autora.

Z innego punktu widzenia Esperanto jest *żyjącym* językiem. W niem czyta, pisze i mówi więcej ludzi, niż w niektórych innych żyjących językach lub narzeczach. Wszyscy, którzy go używają, mimo różnojęzyczności, używają go tak samo.

Zarzucono Esperantu, że jest on językiem sztucznym! Aleć wszystkie nasze języki cywilizowane są w znacznej mierze sztucznymi i stają się ciągle takimi pod potężnym wpływem inteligentnej woli. Między Esperantem a tak zwanymi językami „naturalnymi” istnieje różnica nie co do natury, a co do stopnia.

Esperanto jest *wspólnym* językiem, jak jest każdy literacki język, lub właściwiej, język, używany przez kulturalne sfery kraju, który używa tego samego języka; ale Esperanto jest dla ludów, których języki są bardzo różne. Tutaj właśnie leży jedyne prawdziwe niebezpieczeństwo dla języka międzynarodowego, który może pod wpływem języków narodowych zostać skażony i rozpaść się na narzecza. Ale ponieważ Esperanto jest językiem, w którym szczególnie czyta się i pisze, językiem dla każdego *obcym*, więc wyuczonym, niezbyt prawdopodobnym jest narodzenie się narzeczy. Z drugiej strony esperantyści przewidzieli to niebezpieczeństwo i przeciwstawili się mu przez stworzenie Komitetu Językowego i Akademji, których głównem, jeżeli nie jedynem, zadaniem jest strzeżenie jedności, wspólności, czystości języka, przyjmując nowe wyrazy, nowe wyrażenia tylko wtedy, kie-

dy nie sprzeciwiają się one podstawom języka i są ogólnie rozumiane i często używane.

Esperantyści są przekonani, że zwyciężą wszystkie drwiny i trudności, które spotykają na swej drodze. Posiadają oni wiele gazet i przeglądów, mają poza sobą bardzo już bogatą, bardzo różnorodną literaturę, która jest naprawdę *jedna*, dzięki wierności, którą oni zachowują dla swej podstawowej książki „Fundamento”, gdzie dr. Zamenhof skoncentrował, że tak powiemy, swój język: więc *tradycję* Esperanto posiada.

Esperantyści nie dyskutują o swym języku—oni go używają, nie wątpiąc, że wkońcu przeniknie on najbardziej nieprzychylne ośrodki, ponieważ pożyteczny dla wszystkich, nie jest szkodliwy dla nikogo. Poważając języki narodowe Esperanto nie obraża żadnych uczuć.

Stalość ich przekonań jest siłą i gwarancją ostatecznego zwycięstwa.

Th. Cart,

Profesor Wyższej Szkoły Nauk Politycznych.

Alvenu Vi...

Alvenu Vi —
Ho, songo elrevita,
saniga balzamo,
alvenu Vi...
Ardanta flamo
en koro kaŝita,
la fajro brulanta turmente,
ŝiranta animon sopiro
foriĝos...
akceptos Vin koro kontente,
paciĝos
doloro post Via aliro...

Alvenu Vi kaj larma,
la koro mia,
de la ekstazo ĉarma,
de la ekspiro varma
Via —
forĝos pasintecon,
ne plendos plu dolore —

sed ĝoje kaj tutkore
ekamos solulecon —

Alvenu Vi..

Aivenu, ho,
de l' vivo hor' trankvila
ĉar krevaŝ jam koro,
sopiras tro...
Ne laŭroj, gloro,
estonto la brila,
nek vortoj de ies estimo
kaj, homa minlaŭdo — mensoga —
cel' mia —
la revo de l'mia animo
radia,
ideo pacama, alloga..

Aperu do Vi, kara,
kore amata,
ĉu kun la bruo mara,
ĉu kun la ĝu' nektara...

Frata

akcepto Vin atendas —
kaj kun la kor' ĝojplena,
rigardo senĉagrena
mi manojn disetendas

Aperu do...

Eska.



ANONCO.

Dum la XVIII Universala Kongreso de Esperanto s-ro Grenkamp prelegos pri la pola popola kanto. Ĉiuj samideanoj, kiuj posedas la kantojn tradukitajn (povas esti ne eldonitaj) estas insiste petataj sendi ilin prunte al la prelegonto, Adreso: 4, rue de Vaugirard, Paris VI, Francujo.

Rememoroj el Maripoza

Mi estis kvazaŭ traflugante en Maripoza, kaj ankaŭ tute neprecize mi vizitis ĝiajn ĉirkaŭaĵon. Tamen mi restus pli longe en la urbo kaj en la grafolando, se mi scius, ke en la distanco de dekelkaj mejloj de la urbo, vivas en arbaro prototipo de mia Lumturisto. Antaŭ nelonga tempo, Sinjoro M., kiu samtempe kun mi estis en Kalifornio, traleginte „La lumturiston“ rakontis al mi pri renkonto de tute al li simila pola „squater“. Tiun rakonton mi ripetas fidele, koncerne la enhavon.

...Dumvoje al Big Trees, la grandegaj kaliforniaj arboj, mi venis al Maripoza. Tiu urbo antaŭ nelonge kalkulis ĉirkau 15 mil loĝantojn, nune estas da ili dekoble malpli. Estas sciata, ke en la Nova Mondo homoj naskiĝas kiel fungoj, sed ankaŭ ofte ili pasigas papilian vivon. Same okazis kun Maripoza. Ĝis kiam la rivereto Maripoza brilis per ora fundo kaj sur la bordojn lokigis verdajn pecetojn de multekosta metalo, amasitaj estis ĉi tie amerikaj ministoj, „gambuzinos“ el Meksiko kaj komercistoj el la tuta mondo. Poste ĉi-ĉio elmigris. „Oraj“ urboj estas nefirmaj, ĉar la oro pli au malpli frue devas esti elĉerpita. Hodiaŭ urbo Maripoza havas ĉirkaŭ mil loĝantojn kaj la bordoj de la rivero Maripoza estas denove kovritaj per densaĵo de salikoj, arboj kotonaj kaj aliaj plimalgrandaj arbetoj: Tie, kie antaŭe la ministro kantadis vespere: „I crossed Mississippi“, nune kantadas kujotoj. La urbo konsistas el unu strato, en kiu la plej bona konstruaĵo estas lernejo; la dua vidindaĵo estas „Capitol“, tria—hotelo de sinjoro Billing, enhavanta samtempe „salonn“, t. e. drinkejon, kaj „bakery“, t. e. bakejon. Kelkaj aliaj butikoj brilas per elmetitaj objektoj laŭlonge de la strato. Movado komercista estas tamen tie tre malgranda. La butikoj provizas nur la urbon mem, laŭ bezono, ĉar en la ĉirkaŭaĵo estas malmulte da farmohavantoj. La tuta grafolando havas ankoraŭ nemultan loĝantaron, plej parte ĝi muĝas per grandegaj arbaroj, en kiuj estas kelkaj squater'oj.

Kiam nia veturilo enveturis en la urbon, ĝi estis neordinare homplena, ĉar ni venis vendrede kaj tio estas foira tago. Squater'oj veturigas tiutage mielon al drinkejo, en kiu ili interŝanĝe sin provizas per diversaj nutrobjektoj. Aliaj alpelas brutaron, farmohavantoj liveras grenon. Kvankam la emigracio venas al Maripoza tre malrapide, troviĝis tamen ankaŭ kelkaj veturiloj elmigraj, kiuj estas facile rekoneblaj laŭ blankaj altaj tegmento kaj laŭ tio, ke inter la radoj

ĉiam estas alĉenita hundo, prociono aŭ ursido. Movado antaŭ la hotelo estis nemalgranda, la mastro de la hotelo, sinjoro Billing, iradis tien kaj reen, disportante gin, whisky kaj brandy. De unua ekrigardo li rekonis en mi eksterlandanon, veturantan al Big Trees; ĉar la similaj turistoj estas plej dezirata klientaro por li, li okupiĝis pri mi kun speciala zorgemo.

Tio estis jam neĵuna homo, sed movema kaj vigla kiel fajrero. Laŭ liaj movoj kaj laŭ lia vizaĝo oni facile povis ekkoni, ke li ne estis Pruso. Kun granda ĝentileco li montris al mi mian ĉambron. Li klarigis, ke jam estas post breakfast, sed se mi deziras, oni tuj alportos al mi manĝaĵon en „dining room“.

— Gentelman certe el San Francisco?

— Ho, ne. El pli malproksimaj regionoj.

— All right! Certe al Big Trees?

— Jes.

— Se vi deziras trarigardi fotografaĵon de la arboj, ili pendas malsupre.

— Bone, mi baldaŭ malsupreniros.

— Ĉu vi longe restos en Maripoza?

— Kelkajn tagojn. Mi devas ripozi kaj poste mi volas vidi ĉirkaŭajn arbarojn.

— Ĉasado tie ĉi estas bonega. Antaŭ nelonge oni mortigis pumon.

— Bone, bone. Nun mi iros dormi.

— Good bye! Malsupre estas hotela libro, en kiun bonvolu enskribi vian nomon.

— Bone.

Mi kuŝiĝis dormi kaj dormis ĝis la tagmanĝo, pri kiu oni informis per bastonado je minista pelvo. Mi malsupreniris kaj antaŭ ĉio mi enskribiĝis en la libron, neforgesinte aldoni al mia nomo: from Poland. Sekve mi iris al „dining room“. La foiro videble jam estis finita, komercantoj disveturiĝis hejmen, ĉar por tagmanĝi sidiĝis nur kelkaj personoj. Du familioj de farmohavantoj, ia sinjoro sen okulo kaj kravato, ĉi-loka instruistino, kiu evidente konstante loĝis en la hotelo kaj ia maljunulo, se mi povis laŭ vesto kaj armaĵo rekoni — squater. Ni manĝis en silento, rompata nur de la mallongaj frazoj: „Mi volus vin danki, sinjoro, por la pano“ aŭ „por la butero“ aŭ „por la salo“. Tiamaniere la sidantoj pli malproksime de pano, butero aŭ salo petas pri alŝovo de tiuj objektoj pli proksime sidantajn najbarojn. Mi estis laca kaj mi ne volis komenci la interparolon. Sed mi ĉirkaŭrigardis la ĉambron, sur kies muroj, kiel diris Sinjoro Billing, pendis fotografoj de la arboj grandegaj. Do: Father of the Forest“ aŭ patro de la arbaro, jam fortranĉita. Tamen ĝi ne havis forton porti siajn 4.000 jarojn sur sia supro.

Longeco: 450 futojn, perimetro 112. Bela paĝo! Ne estas kredindaj la okuloj kaj la surskriboj. „Grizzled Giant“: 15 ulnojn de diametro. Nu! eĉ niaj Hebreoj pripensus, se oni ordonus al ili liveri tian kreskaĵeton al Gdańsk. Mia animo saltadis pro ĝojo je penso, ke mi baldaŭ ekvidos en la naturo kaj per propraj okuloj tiun grupon da arboj, pli ĝuste da turoj kolosaj, starantaj solece en la arbaro... depost la diluvo. Mi Varsoviano, ekvidos per la propraj okuloj „la patron“, mi ektuŝos ĝian ŝelon kaj eble pecon da ĝi mi veturigos al Warszawa por pruvi al la skeptikuloj, ke mi vere estis en Kalifornio. Homo, kiu simile erarvadis, al si mem ŝajnas stranga kaj malgraŭvole ĝojas je penso. kiel li rakontados revenonte kaj kiel la lokaj skeptikuloj ne kredos lin, ke estas en la mondo arboj, havantaj kvindek ses ulnojn en perimetro. Tiujn meditojn interrompis al mi voĉo de negro:

— Nigran kafon? blankan?

— Nigran, kia vi mem estas — mi volis respondi, sed la respondo estus neĝusta, ĉar la maljuna negro havis blankan kiel lakto hararon kaj penege tiris post si la piedojn pro maljuneco.

Dume la tagmanĝo estis finita. Leviĝis ĉiuj. La patro, farmohavanto, plenigis sian buŝon per tabako, la patrino edzino, sidiĝinte sur arka seĝo, komencis sin balanci persiste kaj la filino helhara Polly aŭ Katty iris al pianino kaj post momento mi ekaŭdis:

„Yankee Doodle is going down Town...“

— Oni min ne kortuŝos per „Yankee Doodle!“ — mi ekpensis. — De New-York ĝis Maripoza ludas tion fraŭlinoj je fortepianoj, soldatoj je trumpetoj, negroj je banĝaĵoj, infanoj je pecoj da bovaj ripoj. Mi forgesis! Ankoraŭ sur ŝipo persekutis min „Yankee Doodle“. Post ia tempo certe aperos en Ameriko malsano: Yankee — Doodle — fobio! Mi ekfumis cigaron kaj eliris la straton. loma mallumo ĉirkaŭis ĉion. La veturiloj disveturis, la elmigrintoj ankaŭ. Estis senbrue kaj ĉarme. La okcidento ruĝiĝis, la oriento malheliĝis. Al mi estis iel gaje kaj bone. Vivo ŝajnis al mi tre agrabla, malpeza, libera. El ĝardenetoj apud la domoj estis aŭdeblaj kantoj, ie inter kreskaĵoj per momento aperas blanka robeto ie paro da helaj okuloj. Kia belega estis la vespero! Bedaŭrinde nur, ke la Amerikanoj kutimas vespere bruli balaĵojn en la strato. Odoro de fumo tute malnepre miksiĝas jen kun aromo de rozoj kaj kun freŝa bonodoro de la proksimaj arbaroj. De tempo al tempo el la apudurbaj kampoj kaj densaĵoj estis aŭdataj elĥoj de pafado, ĉar preskaŭ ĉiuj loĝantoj de Maripoza estas ĉasistoj; fine la movado ĉesiĝis, la balaĵoj estis finbrulataj. En la strato mi renkontis kelkajn personojn, kaj mi ne scias, ĉu malgraŭvole mian prepran agordigon mi transportis en la vizaĝojn de la aliaj, sed inter la

mildaj briloj de la sunsubiro, ĉiuj vizaĝoj ŝajnis al mi neordinare kontentaj, trankvilaj kaj feliĉaj.

— Eble — mi pensis — oni vivas ĉi-tie kviete, trankvile kaj feliĉe, en tiu nekonata, kaŝita en arbaroj angulo de l'mondo. Eble en tiu Amerika libereco, animo tiel disradiĝas kaj brilas per milda lumo kvazaŭ lampiro. Tie-ĉi estas ankaŭ nemalsate, kaj nemalvarme, kaj multe da spaco, estas loko por distriĝi, estas loko por manojn etendi... Kaj tiuj arbaroj tiel trankvilaj, ah! kiel trankvilaj... kelkaj negroj, irantaj kontraŭ mi, kantis per belsonetaj voĉoj, feliĉe ne „Yankee-Doodle“ sed la „Ārgentajn fadenojn“.

(Daurigota)

trad. M. T.

Kelkaj rememoroj el mia esperanta propagando.

Estas tute kompreneble, ke homo forte konvinkita pri la vereco de l'ideo, kies li estas ano — penas ĝin kiel eble plej vaste konigi al aliaj. Kaj, nome, la esperantistoj apartenas al tiu frakcio de l'homaro, kiun nenio estas kapabla frakasi, kiun nenioj sofistaj teoriaj pruvoj kapablas malkonvinki, ĉar ili posedas faktojn kaj logikajn pruvojn. Esperantistoj vivas en tiu sfero, kiun ne kreskatingis ankoraŭ $\frac{9}{10}$ de tuta homaro; sed ĉi-tio ilin tute ne ĉagrenigas; male, ili eĉ sentas sin pli supre starantaj ol ĉiuj aliaj, ĉar ili estas bone komprenintaj tion, kio por la aliaj estas ankoraŭ nekonfidinda, malklara, respektive ne tute klara. «Veritas vincit» estas nia signaldiro kaj ĝi, nome, liveras la fortojn al propagandisto de Esperanto, ne sukcesinta momente; ĝi provizas lin per tiu neelĉerpebla fonto de l'forto kaj energio, kiujn li donacas al disvastigo de Esperanto.

De l'tempo, kiam mi ekkonis la lingvon internacian de D-ro Zamenhof, t. e. de l'jaro 1912a, mi havis sufiĉe multe da okazoj observadi propagandlaboron de niaj samideanoj. Unuj trovis plej necesa periodan aranĝadon de publikaj lekcioj pri Esperanto, aliaj — presadon de propagandaj priesperantaj artikoloj en ĵurnalaro, ankoraŭ aliaj — portadon de l'okulfrapanta steleto kaj dum interparolo kun iu-ajn alligadon de l'temo al problemo pri lingvo internacia. Neniu el ĉi-tiuj metodoj estas malbona sed ankaŭ neniu el ili sufiĉas por atingi dezirindan sukceson.

En tiuj lokoj, kie estas unu aŭ du esperantistoj, certe ne povas esti grandskala propagando, sed ordinare tiom eta nombro de l'esperantistoj en hodiaŭa tempo estas nur

en malgrandaj urbetoj, kie unu persono ofte povas multe pli fari ol 10-oble pli granda nombro de personoj en iu alia fokuso.

Latina proverbo diras: «Tres facit collegium»; se do unu sola esperantisto kolektos ĉirkaŭ si nur 2 amikojn, jam estos embrio de l'organizaĵo.

Mi memoras kiam en Kronŝtadt (mi estis gimnaziano ankoraŭ) ni, tri esperantistoj, post kelkmonata laboro sukcesis fari grandan „bruon“ inter ĉiuj lokaj gegimnazianoj de tiu urbo. La propagando tiel vaste disvolviĝis, ke en ĉiuj tri ekzistantaj gimnazioj formiĝis esperantistaj rondetoj. La plej aĝa kaj plej malnova el ni esperantisto estis kolego Sergeo Panferov—oklasano kaj lin ni elektis ĝenerala Prezidanto. Sub lia gvido okazadis ĉiuj kunvenoj kaj estis akceptataj ĉiuj decidoj. Ne malmulte ankaŭ helpis al ni S-ro Ernst Drezen, del. de U. E. A., kiu, konforme al nia peto, persone sin turnis al direktoro de nia gimnazio kun propono, ke li permesu fari por gimnazianoj prelegon pri la unika ĝusta solvo de la problemo pri lingvo internacia. La direktoro, jam iom preparita de ni, permesis fari al li tiun prelegon — nia tasko do estis varbi por ĝi laŭeble ĉiujn superajn klasojn de l'vira kaj virina gimnazioj. Ni preparis tiucele por ĉiu klaso, de la V-a komencante, mezgrandan belan surskribon: «Kolegoj! Venu la unuan kaj lastan en Kronŝtadt eksterordinare interesan prelegon pri unika ĝusta solvo de problemo pri lingvo internacia; eniro gratis». Po unu de tiuj surskriboj ni donis al unu konfidinda esperantema kolego de koncernata klaso, petante lin, ke, daŭre de l'tuta semajno, li ĝin elpendigadu sur la tabulo dum ĉiuj interrompoj. Tiu organizmetodo, kvankam iomete stranga—tamen efikis je la junaj animoj kaj alportis neatendite bonajn rezultojn. Klasoj 5-a, 6-a kaj 7-a vizitis tiun prelegon preskaŭ „in corpore“—nur el la oka klaso estis pli malmultaj.

Post tiu aranĝaĵo komenciĝis nova periodo—nia «Kronŝtadta Gimnazia Esperantista Rondo», kalkulis jam tiutempe ĉirkaŭ 30 esperante balbutantajn, fervorajn, efektivajn membrojn. Eldonata tiam „La Ondo de Esperanto“ en Moskvo ofte raportis pri Kronŝtadt. La lasta esperantista entrepreno de tiu organizaĵo, dum mia ĉeesto, estis aranĝo de l'esperanta vespero dum kiu ni prezentis esperantlingve gajan teatraĵeton; «La renkonto» de Marie Hankel, demonstracis plastikan dancon à la Duncan, melodeklamon kaj solkantojn esperantajn, finante la vesperon per danco, gvidata en Esperanto de mi, ĉar Poloj en Rusujo ĉiam estis konsiderataj la plej bonaj dancemuloj. Kelkan tempon post tio, mi forlasis tiun apudĉefurban rusan insul-fortikaĵon por ĉiam, restigante ĉe mi nur bonajn, agrablajn rememorojn.

La sekvantan jaron, t. e. en 1914-a, kiam eksplodis mondmilito, la sorto ĵetis min denove Rusujon, sed tiutempe jam suden: en Harkov, Kiev kaj Rostov-Don. Portata de mi konstante insigno kvinpinta servis kiel renkontilo de multaj samidanoj. Post kelksemajna vagado, rifuĝinte finfine en moderna, bela kaj riĉa urbo Rostov-Don, kaj post malgranda ripozo — mi ekkomencis reserĉadi esperantistojn. Tiu tasko ne estis facile plenumbla. Ĉar nek «La Ondo de Esperanto» nek la «Jarlibro» de U. E. A. ion ajn menciis pri tiu urbo. Sed mi trovis rimedon, prenante iun malnovan Jarlibron kaj hazarde trovante en ĝi nomon de Delegito S-ro D-ro A. Veitzler. La vizito kiun mi faris laŭ indikita en tiu kalendaro adreso, savis de la klopodo, ĉar kvankam la doktoro jam de post du jaroj estis mortinta, tamen lia edzino akceptis min tre gastame, respondante al mi je ĉiuj donataj demandoj. Tiu bonanima virino, vidante mian sinceran interesigon, afable venigis al si per telefono, dum mia ĉeesto, unu el la restintaj lokaj pioniroj S-ron Sokolov, kun kiu mi baldaŭ amikiĝis kaj komencis volvi kelkajn novajn projektojn por estonteco.

Metodo nia estis sekvanta:

1) trovi ĉiujn vivantajn kaj loĝantajn en Rostov-Don malnovajn samideanojn.

2) trovi homojn, interesigantajn aŭ interesigintajn pri Esperanto.

3) vekigi interesigon pri Esperanto en la pli vastaj rondoj de Rostov-Dona urbloĝantaro.

4) ekscii opinion pri Esperanto de la redaktoroj de la lokaj ĉiutagaj gazetoj.

5) Fondi Societon.

Unuan punkton ni plenumis ĉefe helpe de malnovaj adreslibroj esperantistaj kaj de S-ro A. Saĥarov — Direktoro de Moskva Instituto «Esperanto».

Duan punkton ni plenumis per kolektado de informoj pri la opinio koncerne Esperanton kaj varbado al t. n. fondita de ni «Loka Ligo de l'Anoj de Esperanto».

Trian punkton ni plenumis kun ioma peno kaj malfacileco. Estinte jam 4-ope, spertaj esperantistoj, ni decidis riski — kaj pruntedoni ĉiu po kelkaj rubloj por aĉeti pli grandan kvanton de malkaraj 5-kopekaj lernolibroj kaj iom da tabuletoj kun surskriboj: „Tie-ĉi oni vendas memlernolibrojn de internacia helplingvo Esperanto; Prezo 5 kop.“

Akirante tiun provizon, ni interkompreniĝis kun la posedantoj de gazetvendejaj surstrataj kioskoj, proponante al ili elpendigi la tabuleton en videbla loko kaj preni iom da tiuj lernolibroj por komisia vendado, kun certa procenta gajno por ilia bono. Kortreme ni atendis rezultojn. Timante, ke eble komence neniu, aŭ tre malmultaj aĉetados tiujn esp.

lernolibrojn kaj kioskposedantoj rifuzos al ni estonte vendadi ilin, ni mem en la unua monato elaĉetis pere de niaj konatuloj preskaŭ 50 proc. por poste denove doni ilin por vendado, kvazaŭ nova menditaĵo. Ni nepre deziris, ke estu spezo, ke estu aĉetado kaj vendado, ke oni kiel eble plej ofte vidu kaj aŭdu tiun misteran vorton „Esperanto“.

Post tia kelkmonata turmenta kaj malfacila preparlaboro, ni ĝuis konstati, ke 500 lernolibroj estas venditaj kaj elaĉetitaj de homoj, pri kiuj ni tute ne scias. Ni ne juĝis tro optimiste, pensante, ke jam 500 personoj ellernis la lingvon, ĉar el ili verŝajne duono nur trarigardis kelkajn unuajn paĝojn kaj lasis la libreton kuŝi trankvile en betaro aŭ ŝlimputri en iu angulo de malnovaĵoj. Ni supozis modeste, se nur dudeka parto el ĉiuj aĉetintoj serioze ekinteresiĝis, do same por ili, kiel ankaŭ por ni estus tre dezirinde interkonatiĝi por reciproka gajno. Konsiderinte ĉion-ĉi, ni trovis necesa delikate alpaŝi la redaktorojn de lokaj ĉiutagaj ĵurnaloj por pere de ili retrovi tiujn novajn interesitojn. Ĝenerale la redaktoroj rilatis ne tro favore al esperanta movado; nur unu el ili promesis lokigi en sia gazeto iun negrandan artikolon pri tio, se ni ĝin al li liveros manskribe. Havante tiun promeson, ni senhezite verkis artikolon, alvokante samtempe ĉiujn, kiuj interesiĝas pri Esperanto alveni en fiksitan lokon dum certa dato kaj horo al la Organiza Kunveno de Rostov-Dona Societo Esperantista. Alvenis nur 12 novaj personoj; 6 estis alvenigitaj de ni kaj 4 estis ni, malnovaj, efektivaj esperantistoj,—kune 22 personoj. Tiu nombro plene sufiĉis por elutiligi la okazon je bono de nia afero. Malfermite kunvenon per nelonga, preparita parolo pri la progreso de Esperanto en eksterlando — mi petis ĉeestantojn elekti prezidanton de tiu kunveno, kaj oni komencis debatojn. Post 2-hora laboro—**«Rostov-Dona Societo Esperantista»** ekekestis kaj de tiu momento komenciĝis jam tute nova oficiala agadperiodo. Mi ĉesis jam esti plenumanto de ĉiuj teknikaj aferoj, restante nur iniciatanto kaj gvidanto de la Societo. Mi organizas kursojn, horkanton, mandolinkvarteton, ŝak-kaj damludadon k. t. p. k. t. p.

Por entiri novajn personojn, en tiun esperantistan mondon, ni petis, ke almenaŭ 7 diversaj membroj anoncu sin por 2-hora deĵorado ĉiusemajne en Sekretariejo, kie troviĝis oferitaj ĵurnaloj, libroj kaj kien de tempo al tempo alvenadis novaj interesiĝantoj, dezirantaj enskribiĝi ĉu kursojn, ĉu en la Societon, ĉu por ĉerpi iom da informoj pri Esperanto. Tiu deĵorado **«volens—nolens»** konstante pli kaj pli fervorigis kaj firmadis niajn membrojn al nia ideo, kaj trapasinte tian skolon ili restis jam fidelaj kaj sinceraj anoj de Esperanto. Dank'al tiu deĵorado la Societo estis konstante malfermita por ĉiu kaj samtempe la nombro de agantaj esperantistoj videble

pligrandiĝadis. Praktike la diritaj deĵoroj aspektis tiel, ke ĉiuvespere oni povis trovi en la Societejo almenaŭ 4 aŭ 5 esperantistojn, balbutantajn inter si en la nova lingvo kaj 2 ĝis 4 neesperantistajn ŝak-aŭ damludantojn. Tiu labormetodo alportis tre bonan sukceson en la senco de kunligo de la membroj kaj en senco de popularigado de esperanta nomo. Post unu jaro de tiu intern-ekstera laboro, la nomo de nia Societo tiel populariĝis, ke eĉ la redaktoroj ŝanĝis sian opinion pri Esperanto kaj de tempo al tempo konsentadis donadi al ni en siaj eldonaĵoj spacon por senpagaj artikoloj. Tiel mi laboris en tiu Societo ankoraŭ dum 2 jaroj, sed akirinte eblecon reveni Patrujon—mi eĉ sekundon ne hezitis por adiaŭ miajn rusajn, armenajn, hebreajn kunlaborantojn kaj forveturi per germana vagonaro al mia naskiĝurbo Siedlce. Laca, elĉerpita de longedaŭra vojaĝo, trovinta strangajn germanajn prem-leĝojn en la Patrujo, mi kvazaŭ ekdormis por kelkaj monatoj. Kaj eble mi dormus ankoraŭ pli longe, se ne tiu interparolo kun s-ro Alfons Wierzbicka, estinta Delegito de U. E. A. Siedlce, kiu min vekis kaj kiu donis al mi impulson por plua agado en tiu nobla homar-kulturakcelanta afero.

Dum mia loĝado en Warszawa, en jaro 1918-a, konatiĝinte kun la ĉefaj gvidantoj de esperanta movado en Polujo, mi multe profitis pri la ekkono de regantaj rilatoj inter esperantistoj sur Pola tero.

Translokiĝinte Lublinon en jaro 1922-a kaj laborinte tie komence kun esperantistoj de diversaj nacioj, de diversaj politikaj sinorientadoj kaj konvinkoj, mi ankoraŭ pli certiĝis, ke ne sufiĉas fondi Societon, kies celo estas propagando de Esperanto—sed se oni deziras ĝian daŭran prosperon kaj akiron de l'bona opinio en la urbo, oni nepre devas ĉiukaze substrekadi nekontraŭŝtatan kaj nekontraŭnacion karakteron de l'organizaĵo.

Ĝenerala opinio en Polujo sen tio tre facile suspektas esperantistojn kiel homojn, malzorgantajn pri ŝtataj kaj polnaciaj interesoj, la opinio preskaŭ ne imagas eĉ, ke esperantaj organizaĵoj tre sukcese povas kunlabori kun ŝtatorganoj kaj helpi al atingo de ŝtataj aspiroj; ke ili estas kapablaj akceli disvastigadon de veraj sciigoj pri Polujo en eksterlando k. t. p., k. t. p.

Tiuj konsideroj igis min fari klopodojn por malfermi en Lublin Filion de P. E. A. Interkonsiliĝinte kun 3 aliaj polaj samideanoj kaj kolektinte 15 bonvolajn propramanajn polajn subskribojn—mi sukcesis en majo de pasinta jaro sciigi per gazetoj al la loĝantaro de Lublin pri la Organiza Konstitucia Kunveno de la Filio de «Pola Esperanto-Asocio». Elektita

estraro de tiu Filio tuj en la komenco fiksis sian agmanieron por tuta jaro.

Estis decidite:

- 1) Trovi iun-ajn ejon.
- 2) Aranĝi kelkajn elementajn kursojn de E. en 25 horoj ĉiu.
- 3) Lokigi en gazetoj kelkajn pli ampleksajn artik. pri E.
- 4) Liveri al redaktoroj kiel eble plej multe da aktualaj realaj sciigoj el esp. vivo kaj atingitaj sukcesoj.
- 5) Aranĝi iun specialan esp.-kurson.
- 6) Aranĝi iun seriozan lekcion por pli vasta nombro de aŭskultantoj.
- 7) Aranĝi iun eksterurban ekskurson, kun partopreno de ankaŭ neesperantistoj.

Ĉiuj tiuj punktoj estis akurate plenumitaj, kaj Lublina Filio ĝuas doni bonan ateston pri sia vivkapableco kaj persisteco en la decidoj.

Dum tiu jaro oni aranĝis 4 elementajn kursojn, el kiuj unu estis dediĉita speciale por instruistoj de popollernejoj kaj la dua—por poŝt-kaj telegrafocistoj. Oni verkis kaj lokigis en la lokaj gazetoj 4 sufiĉe longajn kaj enhavoplenajn artikolojn kaj oni liveris dum tiu jaro al redaktejoj kune 215 malgrandajn kronikajn sciigojn kaj donis 27 foje pagatajn pli aŭ malpli grandajn anoncojn. Vic-Del. de U. E. A. s-ro Seweryn Przybyszewski bonvolis fari en la plej bela en Lublin salono de la Muzika Societo lekcion pri radio-disaŭdigado, interplektante konstante tiun-ĉi eltrovaĵon kun U. E. A. kaj Esperanto, kiel absolute necesa helpilo por ĉiu radiisto kaj radioamatoro.

Fine la Societo aranĝis, jam en majo de tiu-ĉi jaro, du ekster-urbajn ekskursojn kun kordaj pinĉinstrumentoj kaj kun kant' sur lipoj.

Resumante ĉion diritan, ne nur koncerne la agadon de lublina «Pola Esp. Societo», sed ankaŭ koncerne la Rostov-Donan kaj Kronŝtadtan societojn — pri kiuj sufiĉe vaste estis mencite pli frue, mi kuraĝas konkludi, ke ĉie, kie estas almenaŭ unu arda esperantisto, posedanta iom da forta volo, scio, persisteco kaj firma konvinko, ke Esperanto estas noble lafero—tie sukceso de esperanta prospero kaj disvolvigo estas garantiita.

Oni ne bezonas posedi por tio specialajn propagandajn kapablecojn; sufiĉos nur iom da vivsaĝeco kaj konstanteco en la komencita ago por resti venkinto en esperanta batalo.

„Se longa sekeco aŭ ventoj subitaj
Velkantajn foliojn deŝiras,
Ni dankas la venton kaj, repurigitaj,
Ni forton pli freŝan akiras“.

diris nia neforgesebla, kara Majstro en sia belega himno «La vojo». Kaj vera propagandisto de lia ideo neniam devas forgesi pri tiuj vortoj.

Li devas bone memori, ke ĉiun lian agon en direkto de Esperanta propagando hodiaŭ certe postsekvos multaj diversaj komentarioj de kontraŭuloj, suspektoj, supozoj kaj aliaj erar-aĵoj. Li devas esti preparita je ĉi-tio kaj lia solkonsolo en tiuj momentoj devas esti konscio, ke li agas kaj batalas por la plej nobla en la mondo afero, por la bono de l'tuta homaro, por la bono de sia Patrujo.

Czesław Pruski.

Prof. Cart pri Landnomoj.

De l'Prezidanto de l'Akademio ni ricevis tre klaran noton pri la landnomoj laŭ Zamenhofa sistemo. Tiun ĉi noton ni resumas ĉi sube:

Malnova Mondo

La gento donas sian nomon al sia lando per aldono de l'sufikso *ujo*, laŭ jena modelo:

Franco (gento), Franca (adjektivo), Francujo (lando).

Listo de Ŝtatoj

Anglujo, Aŭstrujo, Bavarujo, Belgujo, Britujo, Bulgarujo, Ĉeĥoslovakujo, Danujo, Egiptujo, Estonujo, Fin(n)ujo (Fin(n)lando), Francujo, Germanujo, Grekujo, Hindujo, Hispanujo, Holandujo, Hungarujo, Ĥinujo, Italujo, Japanujo, Jugoslavujo, Katalanujo, Latvujo, Litovujo, Norvegujo, Persujo, Polujo, Portugalujo, Prusujo, Rumanujo, Rusujo, Saksujo, Skotujo (Skotlando), Svedujo, Svisujo, Turkujo, k. t. p.

Nova Mondo

Ĉar politike malaperis la primitivaj gentoj, la lando mem donas sian nomon al la regnano per aldono de l'sufikso-*ano*

laŭ jena modelo:

Usono (lando), Usona (adjektivo), Usonano (regnano).

Listo de Ŝtatoj

Algerio, Argentino, Aŭstralio, Bolivio, Brazil(i)o, Ĉil(i)o, Kanado, Kaplando, Kolombio, Maroko, Meksikio, Nov-Zelando, Peruo, Tunizio, Urugvajo, Usono, Venezuelo, k. t. p.

Nomoj de Provincoj kaj Urboj

Aldoni la finaĵon *-o* al la provinca nomo: *Brandenburgo, Silezio, Provenco* — se ne eble, senŝanĝe: *Loiret, Essex*.

Kelkaj nomoj de gravaj ĉefurboj esperantiĝis: *Parizo, Ĝenevo, Kopenhago*. — Aliaj simple alprenas la finaĵon *-o*: *Londono, Berlino* — se ne eble, senŝanĝe: *Versailles, Breslau*.

Prof. Cart aldonas, ke en tiu ĉi landnoma demando kiel en aliaj, plej bona gvidanto restas por ni D-ro Zamenhof.

En Pola Esperantisto ni uzos regule la suprecititajn nomojn kaj esperas, ke, *pro necesa unueco*, ĉiuj Esperantistaj gazetoj same faros.

El la Lingva Komitato.

Dum la lastaj elektoj al la Lingva Komitato oni elektis la polajn kandidatojn: S-ron Stanisław Karolczyk, redaktoron de nia gazeto, estintan prezidanton de la P. E.-A., s-ron Jan Kostecki, bravan vicprezidinton de

PEA. kaj s-ron Salo Grenkamp.

Al la estimataj elektitoj la tuta pola esperantistaro prezentas sian koran gratulon kaj deziron labori por nia afero kun ne malpli da fervoro kaj sindono, ol ili laboris ĝis nun.

Ze ŝwiata esperanckiego.

Esperanto w telegrafji.

Czechosłowackie ministerjum poczt i telegrafu dekretem z dnia 8-go kwietnia uznało Esperanto jako język jasny i nadający się do użytku w telegrafji.

Według decyzji zeszłorocznej konferencji Powszechnej Unji Pocztowej w Paryżu, Esperanto będzie używane w stosunkach międzynarodowych dopiero od 1-go listopada 1926 r.

Stosownie do tej decyzji ministerjum poczty niemieckiej republiki uznało dn. 12-go kwietnia, że Esperanto jako język jasny może być używany w telegrafji od dn. 1-go listopada

Esperanto w technice

Niemiecki związek techniczno-naukowych stowarzyszeń, do którego należą najważniejsze korporacje, żywo interesując się Esperantem, wydelegował swego dyrektora administracyjnego na ostatni powszechny kongres esperancki.

Organ Związku „Postęp inży-

nierski“ z dodatkami w języku angielskim i hiszpańskim, zawiera w każdym dziale osobną rubrykę esperancką. Związek stara się skorzystać z postępu ruchu esperanckiego do wzmocnienia swych zagranicznych stosunków.

Literatura esperancka.

Literatura esperancka, która zawiera już przeszło 5000 tomów, została ostatnio znacznie wzbogacona przez wydanie 500 stronicowych „Wypisów kataluńskich“ (Kataluna Antologio), które zamierzają zapoznać zagranicę z bogactwem kataluńskiej literatury.

W tych dniach ukazały się pierwsze zeszyty biblioteki esperanckiej, wydawanej przez znaną firmę Rudolf Mosse.

Język Esperanto w szkołach.

Na ostatnim Kongresie w Genewie p. Oltramare, szef departamentu nauczania publicznego kantonu genewskiego, podkreślał doskonałe wyniki, jakie osiągnęło Esperanto w szkołach ge-

newskich. Zaznaczył on, że „Le Conseil d'Etat“ zażąda zwołania Konferencji międzynarodowej, któraby uchwaliła wprowadzenie nauczania Esperanta w szkołach różnych krajów.

W Wyższej Szkole w Rydze prowadzone są trzy kursy Esperanta pod protektoratem ministerjum oświaty.

W miejskiej szkole handlowej miasta Lyon zorganizowano obowiązkowy kurs Esperanta.

Podobnie przymusowy kurs urządzono w miejskiej szkole dla dziewcząt w Bratysławie. Prócz tego w Czechosłowacji egzystują oficjalne kursy w wyższej Szkole górniczej w Przybramie, w Akademji Handlowej w Hradcu Karlovym i Ołomuńcu, w szkole handlowej w Bernie i w Liceum w Hradcu Karlovym.

Z międzynarodowych Kongresów.

Na kongresie „Groupements Universitaires pour la Société des Nations“ w Sztrasburgu 20 grudnia roku zeszłego powzięto następujące uchwały:

1. Dzieło pokoju i współpracy międzynarodowej, podjęte przez „Société des Nations“ będzie wypełnione dopiero wtedy, gdy duch pokoju przeniknie głęboko dusze ludów wszystkich państw.

2. Trzeba starać się wszelkimi sposobami, aby ogół ludzi

zrozumiał, że wszystkie rasy ludzkie są sobie równe i aby zrodziło się uczucie braterstwa i ogólnoludzkiej sympatji.

3. Główną przeszkodą dla zbliżenia się ludzkości stanowi różnorodność językowa.

4. Przeszkoda ta zniknie z czasem, gdy wejdzie w użycie język pomocniczy Esperanto.

Na kongresie powszechnym pokoju, który się odbył 5 września w Paryżu przyjęto następującą rezolucję:

Kongres wyraża się przychylnie o języku pomocniczym Esperanto i prosi wychowawców, aby się starali wszelkimi sposobami o nauczenie tego języka swoich uczniów.

Esperanto w Finlandji.

Minister Nauczania powszechnego w Finlandji przyznał subwencję w wysokości 6000 marek, na zorganizowanie w Helsingforsie, podczas Bożego Narodzenia — kursu języka Esperanto dla nauczycieli, jak również na wydanie broszury, propagującej język Esperanto, napisanej przez M. Sebälä, profesora uniwersytetu w Heisingforsie i obecnego ministra spraw zagranicznych.

Wiedeń.

4 stycznia otwarto tu 6 kursów języka Esperanto dla urzędników kolejowych. Na kurs uczęszcza 220 urzędników.

Disvastigu vian organon!

Redaktoro kaj eldonanto: Stanisław Karolczyk.
Sekretario de la Red.: Mieczysław Trochimowski.

Presejo: Fratoj Wójcikiewicz, Warszawa, Fawia 10.

Deziras korespondi.

(Mallongigoj: PK—poŝtkartoj, PI—poŝtkartoj ilustritaj, PM—poŝtmarkoj, L — leteroj, kĉl—kun ĉiuj landoj, bfl—poŝtmarkoj sur la bildflanko de la poŝtkarto).

S-ro *Raphael Noguera*, profesoro de kantoscienco kaj inĝeniera studento, Carangola, Estado de Minas, (Brazilo) deziras korespondi kĉl per PK, PI, PM, L, ktp. Ĉiam kaj tuj nepre

respondas, nur esperante.

S-ro *A. Sidorov*, N strelkovi polk Dondibizii, Rostov n/Don, (Sovetunio) deziras korespondi per PI, L kaj interesanĝi esper. gazetojn kĉl.

Ricevitaj gazetoj

The British Esperantist N-roj 254, 255, Unione N-ro 3, Heroldo de Esperanto N-roj 30, 31, 32, 33, 34, 35, 36, La Kolportisto N-roj 3, 4, Marto N-roj 5, 6, Esperanto-Utiset N-ro 2/3, Kataluna Esperantisto N-ro 23, Belga Esperantisto N-ro 5, La Suna Kruco N-roj 70, 71, Portugal-Esperanto N-roj 4, 5, Esperanto (rumana) N-roj 3/4, Esperanto de UEA N-ro 6, International Language junio, julio, Libero N-roj 4, 5, Academia pro Interlingua N-ro 3, Oomoto (japana) N-ro 16, La Ora Epoko N-ro 15, Revista

del Ateneo N-ro 22, Oomoto (pariza) N-ro 5, Konkordo N-ro 4/5, La Movado N-ro 87, La Revue de l'Univers N-ro 32, 33, 34, Germana Esperantisto N-ro 6, La Revuo Orienta N-ro 5, Arbeiter-Esperantisten N-ro 4/5, Sennaciulo N-roj 36, 37, Informoj de Esperanto-Asocio de Estonio N-ro 52, Paris-Esperanto N-roj 24, Le Monde Esperantiste N-ro 3, Bulgara Esperantisto N-ro 9, Verda Mondo N-ro 5, Espero Katolika N-ro 20, La Nova Tago N-ro 2, Express Kaliski.

Nowe uzupełnione wydanie

Kompletnego podręcznika języka Esperanto

Leo Turno, członka Komitetu językowego, ukazało się już nakładem autora i jest do nabycia w cenie zł. 1.25 za egz. Wysyła się najmniej 5 egz. Przy zamówieniu 10 — 25 egz. udziela się 25% rabatu, 25 — 30 egz. 30% rabatu. 30 — 100 egz. 38 1/3% rabatu. Wysyłkę uskutecznią się po utrzymaniu należności na P. K. O. Kraków, nr. 405.716 lub na adres:

LEOPOLD DREHER, Kraków, Starowiślna 37.

Ĉu vi jam aŭdis pri la
Ligo de Religioj
kuniganta ĉiujn sincerajn kredojn?

Ĉu vi konas jam la
Universalan Homaman Asocion
kiu realigas la penson de D-ro L. Zamenhof pri la
Homaranismo?

Ĉu vi legis jam pri la nova spirita movado

OOMOTO

**eliranta al Japanujo kaj donanta al
la Homaro novan Kredon, kiu kreos
pacon, amon, kaj prosperon?**

La mesio reenkarniginta jam aperis en la oriento.

Li baldaŭ realigos la dian planon, Legantoj, rapidu
peti senpagan propagandilon kaj specimenon de
la ĵuralo

Oomoto Internacia

Eŭropa Propagandoficejo de OOMOTO,
49, Rue Boulard PARIS XIV. Francujo.

Kiu varbos 5 novajn abonantojn
ricevados nian organon
senpage dum la tuta jaro